# *Kuba ambasadorino en Ukrainio denuncas usonan blokadon kontra? Kubo*



**Foto: Prensa Latina.**

Kievo, apr 24 (RHK) La ekonomia, komerca kaj financa blokado trudata de Usono kontra? Kubo reprezentas bremson por la ekonomia kaj socia evoluo de la kariba insulo, denuncis la ambasadorino de Havano en Ukrainio, Natacha Díaz, la? elstarigis la loka gazetaro.

Dum intervjuo ?e la ukrainia semajngazeto 2000, la kuba diplomatino esprimis ke tiu politiko havas negativajn sekvojn en la bonfarto de la kubanoj, samkiel en la starigo  de la Nacia Plano de Ekonomia kaj Socia Evoluo de Kubo ?is 2030 kaj la Celaro de Da?ripova Evoluo.

?i komentis ke pasintjare, la registaro de Donald Trump uzis la krizan situacion provokitan de Kovim-19 por fortigi la sie?on kontra? la kariba insulo, kio malfaciligis la kapablojn de la lando por fronti la

pandemion.

La ambasadorino emfazis ke la genocida karaktero de tiu usona politiko forti?is en sia eksterteritoria apliko kaj tial senigis la insulon je la ebleco akiri pulmajn ventolilojn mekanikajn, maskojn, diagnozilojn, okulprotektilojn  kaj aliajn necesajn ilojn por mastrumi la malsanon.

?i nombris multajn ekzemplojn pri tiu politiko kaj anka? citis la persekuton kaj minacojn kontra? entreprenoj, kiuj sendas provizojn de brula?oj al la insulo, plus la kampanjo cele senkreditigi la programojn de medicina kunlaboro de la insulo.

La ambasadorino konfirmis ke la usona sie?o kontra? Kubo konsistigas amasan, evidentan kaj konstantan perforton de la homaj rajtoj de la kubanoj kaj ?i estas kongrua al la kvalifiko de genocida ago la? la normoj de la internacia juro.

fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/255177-kuba-ambasadorino-en-ukrainio-denuncas-usonan-blokadon-kontrau-kubo

Radio Habana Cuba